

FLANDRA ESPERANTISTO

MONATA REVUO

ORGANO DE LA FLANDRA
ESPERANTO
MOVADO

Officieel Orgaan
van den

Vlaamschen
Esperantisten -
Bond



Administranto: A. De Keyzer, P. Van Humbeekstraat, 3, Brussel-West.

JARA ABONPREZO: 20 fr. — Eksterlando: 5 belgoj.

Kun membreco al « Flandra Ligo Esperantista »: 25 fr.
Eksterlando: 6 belgoj.

Flandra Esperanto - Instituto

Vereeniging zonder Winstbejag
Magdalenastraat, 29, KORTRIJK

Postĉekkonto: F. E. I. 3268.51 — Telefono: 1654

EL LA PREZARO:

| | |
|---|---------------|
| En okcidento nenio nova — Remarque. | Fr. 55,— bind |
| La Viro el Francujo — Ivans | 29,— » |
| Per Balono al la Poluso — Andrée | 65,— » |
| Riĉa kaj sen Mono — Oppenheim | 29,— » |
| La Ora ŝtuparo — Oppenheim | 29,— » |
| Si — H. Rider Haggard | 29,— » |
| Tra la Labirinto de la Gramatiko | 40,— » |
| Elektitaj Noveloj — Lode Baekelmans | 7,50 broŝ. |
| Amo kaj Poezio — Jan Van Schoor | 10,— » |
| La Du Amatinoj — de Musset | 7,50 » |
| La Mono de S-ro Arne — Selma Lagerlöf | 12,— » |
| Gösta Berling — S. Lagerlöf | 45,— » |
| La Homaj rasoj de la Mondo | 24,— » |
| Kudlago, la malgranda eskimo | 5,— » |
| La Juna Vivo (1934-1935) | 15,— » |
| Pallieter — F. Timmermans | 35,— » |
| Barbro kaj Eriko — Letera romaneto | 4,— » |
| Anni kaj Montmartre — R. Schwartz. | 18,— » |
| Verdaj Donkiĥotoj — J. Baghy. | 18,— » |
| Gaja Lernolibro (ilustrita) | 12,— » |
| Examenopgaven | 10,— » |
| Jubileumboek (Fed. Arbeiders Esperantisten) | 10,— » |
| Blinda Rozo — H. Conscience | 4,— » |
| Het Esperanto in 10 lessen — Witterijck | 5,— » |
| Zakwoordenboekje (2400 stamwoorden) | 2,50 » |
| Schildlof Zakwoordenboek | 25,— bind |
| Groot Woordenboek Van Straaten | 80,— bind |
| Flandra Esper. 2-a, 3-a, 4-a, 5-a kaj 6-a jarkolektoj | 15,— broŝ. |
| Flandra Esperantisto, 1-a jarkolekto (sen la n° 1) | 10,— » |

INSIGNOJ: Malgranda verda stelo: 2.00 fr.

Verda stelo, sur blanka fono: 2,50 fr.

Verda stelo, kun kruco: 2,50 fr.

Granda verda stelo, kun blanka rando: 4,50 fr.


Glumarkoj, en lingvo Flandra aŭ Esperanta: folio de 8 diversaj markoj kostas po 5,— fr. por 10 folioj.

Krajono kun surpriso « Esperanto »: 1,— fr.

Leterpapero kaj kovertoj por 20 po 3,— fr.

Poŝtkartoj: por 10 po 1 fr.

Flandra Esperantisto



Oficiala Organo de Flandra Ligo Esperantista
Aperas ĉiumonate

Ĉefredaktoro:
C. Schroeyers
Transvaalstraat, 10
Berchem
Antwerpen



Administranto:
Adolf De Keyzer
P. van Humbeekstr., 3
Brussel (West)

Jara abonprezo: 20 frankoj. — Eksterlando: 5 belgoj
Kun membreco al F.L.E.: 25 fr.
Eksterlando: 6 belgoj
Poŝtĉeko: 2321.50 de F.L.E. Brussel.

Konstantaj kunlaborantoj: L. CALLOENS, G. DE-
BROUWERE, L. v. d. POEL, E. CORTVRIENDT,
H. VAN DURME kaj aliaj.

Grava dato

Provizore nur por ni, Esperantistoj, la 15-a de Decembro estas tago grava kaj memorinda. Tamen en pli malpli fora esento ĝi iĝos dato de granda historia signifo. Naskiĝis tiun tagon, en la jaro 1836, L. L. Zamenhof kiun ni kutimas nomi « Majstro » pro danko, admiro kaj profunda respekto.

La biografioj pri Zamenhof estas por la Esperantistoj neelĉerpeblaj fontoj de nova kuraĝo. Konstantan, nemalfortigantan fervoron posedas nur tiuj propagandistoj kiuj funde konas la vivon kaj verkon de la nobla Zamenhof. Tial ni bedaŭras, ke tiom malmulte da Esperantistoj scias detale pri tio.

Festi la datrevenon de la Zamenhofa naskiĝtago per la aĉeto de Esperanta libro estas laŭdinda kutimo de la Esperantistoj. Ĉu pli efike ni povus soleni tiun daton ol per nia praktika helpo al la konstruo de la vivanta Zamenhof-monumento: la Esperanto-literaturo?

Ni vivas en prospera periodo por la Esperanto-literaturo. Apenaŭ ni legis recenzon pri aperinta verko, ke jam nova eldonaĵo estas anoncata. Pluraj eldonejoj regule provizas la verdan merkaton per novaĵoj, societoj de libro-tagoj helpas al la disvastigo de nia literaturo. La verkemo, la tradukemo floras. Vivas Esperanto.

Kiagrade ni, Flandraj Esperantistoj, vivtenas la Esperantan literaturon? Ni konfesu sincere, ke nur tre malmultaj inter ni tiurilate montras sufiĉan intereson. Ĉu ankaŭ por ni valoras la absurdaĵo: « mono por libro elspezita estas forĵetita »? Reago necesas! Niaj sekcioj pliampleksigu siajn bibliotekojn kaj persone ni prenu la firman decidon dum Decembro pliriĉigi nian propran libro-ŝrankon per Esperanto-verko. Ni superŝutu nian Instituton per mendoj!

E. C.


N. A. L. M. (Nia Estas La Estonteco)

81

Flandra Esperantista Grupo

Ejo * Breughel *

Em. Jacquainlaan, 37, Brussel (Belg.)



7a FLANDRA KONGRESO DE ESPERANTO - GENT

PENTEKOSTO
1936

ALIĜILO

Resendota al :

Organiza Komitato de la 7^a Flandra Kongreso de Esperanto,
Raapstraat, 82, Gent

Poŝtĉekkonto : **1530.50** de

Ach. De Maertelaere, Provenierstersstraat, 25, Gent.

Mi deziras aliĝi al la 7^a Flandra kongreso de Esperanto kaj tiu-cele mi pagas por :

| | |
|--|----------|
| Kongreskarto | fr. 12.— |
| Glumarkoj (6 fr. po 100) | » |
| Festeno (inkluzive vino) 25 fr. | » |
| » vegetaraj manĝaĵoj | |
| (sen trinkaĵo) 15 fr. | » |
| Ŝipekskurso al Deurle | » 10.— |
| Lunda tagmanĝo | » 10.— |
| Loĝado dum la noktoj de sabato, dimanĉo en | |
| ^{unu} persona ĉambro, kun | |
| ^{du} | |

Sro, S^{ino}, F^{ino} fr. _____

Sume fr. _____

Nomo :

Strato kaj numero :

Urbo (event. lando) :

RIMARKOJ. - **LOĜADO** : ni insiste petas al la kongresanoj kiel eble plej multe peti ĉambron por du personoj. Ni havas malmultan loĝeblecon unu-personan, plie la du-persona loĝado estas pli favora.

La loĝadtarifo entenas : loĝadon, matenmanĝon, servmonon kaj taksojn. La loĝadkarton oni kvitance donos al la hotelestro.

Loĝadprezoj

| | | |
|--------------------------------------|---|--|
| 1 persono (sole en ĉambro) |  | 2 personoj (kune en ĉambro) (prezo po persono) |
| fr. 20 - 22.50 - 25 - 35 | | fr. 17.50 - 20 - 22.50 - 30 |
| Post-Hotel : fr. 45 - 50 | | Post-Hotel : fr. 35 - 40 |

Al la personoj kiuj enskribos antaŭ la **15 de Majo** ni garantias loĝadon. Post tiu dato ni nur prizorgos laŭ ebleco. La kongresanoj ankaŭ bonvolu priatenti tiun daton (15 de Majo) por la **ŜIPEKSKURSO, FESTENO kaj LUNDA TAGMANĜO.**

La personoj kiuj ne antaŭe enskribos, devos mem prizorgi la manĝaĵojn.

La unuaj enskribontoj por la ŝipekskurso havos la antaŭecon. Je tro multe da enskriboj por unu ŝipo kaj tro malmulte por du, la lastaj enskribontoj devos iri per elektra tramveturilo.

Dimanĉe posttagmeze, post la festeno, mi deziras partopreni viziton al la :

* Malgranda Beginejo
Grafa kastelo
Sankta Bavo-preĝejo
Folkloro muzeo

* trastroku la ne-deziran

Eventuale specialajn dezirojn komuniku.

Ligkunveno

Okazos la 13an de Decembro, je la 10a matene, en la ejo Breughel, Em. Jacqumainlaan, 37, Bruselo. La diversaj sekcioj nepre sendu delegiton ; la reprezentantojn ni petas ĉeesti. Taŭga laboro nur ekestas el la kunlaboro de ĉiuj !

TAGORDO :

- 1) Raporto de la antaŭa kunveno.
- 2) Ekspozicia materialo.
- 3) Ĉekursoj.
- 4) Situacio kaj eblecoj en la diversaj lokoj.
- 5) Sekcioj kaj Ligo.
- 6) Sciigoj pri la situacio de la internacia movado.
- 7) La instituto.
- 8) Gazetservo.
- 9) La kongreso.
- 10) Diversaj.

N. B. — La Estraro kunvenu je la 9a, por specialaj komunikoj.

La Prezidanto.

H. RAINSON.

OKAZE DE LA LIBROTAGO

La ses unuaj jarkolektoj de « Flandra Esperantisto » kune pli ol 1150 paĝoj estas haveblaj je la favora prezo de
35,— Fr.

je mendo de nur unu kolekto :

7,50 Fr.

Nepre necesaj en ĉiu grupa biblioteko !

Nepre bezonaj al niaj propagandistoj !

Ni sendas
afrankite.

La oferto validas
nur dum Decembro.

Mendu ĉe Flandra Esperanto-Instituto

Magdalenastr., 29, Kortrijk — Gironumero : 326851

La numero unu de la unua jarkolekto kaj la 2a jarkolekto estas elĉerpitaj.

Esperanto in de Praktijk.

ARGENTINIE.

Op haar algemeene jaarvergadering nam de Argentijnsche vegetariërs-vereeniging een resolutie aan, waarin het gebruik van Esperanto wordt aangenomen in het internationaal verkeer en de leden geadviseerd worden Esperanto te leeren. In « Vitalismo », orgaan dezer vereeniging, verschijnt een Esperanto-rubriek.

DENEMARKEN.

Door den neutralen Esperanto-bond (1.600 leden) werd een petitionnement op touw gezet met het doel Esperanto in te voeren bij het avond- en technisch onderwijs. Men rekent op minstens 80.000 handteekeningen.

FRANKRIJK.

Door het bestuur van de Fransche Jeugdherberg Centrale werd besloten, op het internationaal Jeugdherbergkongres, Esperanto voor te stellen als officieele taal der internationale vereeniging van Jeugdherbergen alsmede de internationale taal aan te bevelen aan de jeugd en de herberghouders. Deze motie wordt gesteund door het Deutsche Jeugdherbergbestuur in Tsjecho-Slowakije en door de Iersche en Engelsche Jeugdherberg Centralen.

HONGARIE.

De Hongaarsch-Italiaansche Bank en de Hongaarsche Algemeene Kredietbank korespondeeren in Esperanto. Laatst genoemde past in haar drukwerk de internationale taal toe.

ITALIE.

Op de in Juli gehouden konferentie van de Radio Club d'Italia werd een resolutie aangenomen, waarin wordt gekonstateerd dat aan de universeele verbreiding der draadlooze telefonie een middel ontbrak om de taalbelemmeringen te weren en waarbij het gebruik van Esperanto wordt aangeprezen voor de buitenlandsche mededeelingen.

NEDERLAND.

In de groote dagbladen « Het Volk » en « Voorwaarts », met een gezamenlijke oplage van 150.000 ekz., verschijnt, tweemaal in de week, een E-rubriek.

Bij de « Hollanda Esperanto-Eldonejo » te Amsterdam verscheen een merkwaardig boek over het leven van Rembrandt. Dat prachtwerk wordt opgeluisterd door meer dan honderd reproducties der beste doeken van den beroemden meester.

JAPAN.

Zoo pas verscheen een naamboek met de adressen van 4.000 Esperantisten.

SOVJET-RUSLAND.

Het orgaan der S. E. U. (Soveta Esperanto-Unio) meldt dat zijn ledental regelmatig toeneemt. Het aantal leden-Esperantisten bedraagt 6.111 tegen vorig jaar 3.772. Daarnaast kent men nog twee groepen nl. jonge Esperantisten met 3.172 leden tegen vroeger 1.577 en sympathiseerende leden ten getale van 5.954 vorig jaar 3.759. Het totale ledental is dan 14.237 tegen 9.108 en 4.000 in de voorafgaande twee jaren.

TSJECHO-SLOWAKIJE.

Om tot samenwerking te komen op het gebied der radio werd op initiatief van ir. Ant. Slavik, directeur van de radio-omroep in Brno, een vergadering belegd voor de plaatselijke Esperantogroepen. Denkkelijk zal deze samenwerking de beste vruchten afwerpen voor de Esperanto-uitzendingen van dezen, bij de Esperantisten, reeds gunstig gekenden omroep. Op deze vergadering waren ook aanwezig twee leden van het hooger personeel nl. de leider van de literatuurafdeeling en de regisseur, beiden actieve Esperantisten.

ZWEDEN.

De drie belangrijkste radio-bladen van Zweden « Fjensyn og Radio », « Radiobladet » en « Hallo-Hallo » publiceeren regelmatig de Esperanto-programma's.

Uit « *La estonto estas nia* » (Esperanto-persdienst voor Nederland) knippen wij :

ESPERANTO IN DE TSJECHISCHE PERS

Het voorbeeld volgende van vele andere bladen in het buitenland, publiceeren de « Pilsner Tageblatt », « Westböhmsche Tageszeitung », « Süd-Böhmsche Tageszeitung », « Marienbader Neueste Nachrichten », en « Egerländer Tageszeitung » thans regelmatig een Esperanto-rubriek.

ESPERANTO IN DEN HANDEL

De N.V. Werktuigenbureau voor den Landbouw te Sneek, directeur de Heer Kinderman, publiceert regelmatig alle leveringsvoorwaarden in de moderne talen en in het Esperanto. Evenzoo handelt de wereldgekende fotofirma Gevaert te Antwerpen, die reeds lang de bij haar artikelen verpakte gebruiksaanwijzingen mede in het Esperanto geeft.

ESPERANTO EN DE NEDERLANDSCHE LITTERATUUR

Na de prachtige uitgave van het boek over Rembrandt in het Esperanto (Rembrandt la Magiisto), geschreven door den Heer H. Muller, conservator van het Rembrandthuis te Amsterdam, zal thans de bekende Esperanto-uitgeverij « Literatura Mondo » te Budapest een Nederlandsche anthologie in het Esperanto uitgeven.

Deze Nederlandsche Anthologie wordt samengesteld door de bekendste Nederlandsche Esperantisten, onder redactie van den Heer Joh. Hartog te Baarn. Opnieuw werkt de internationale hulptaal Esperanto op deze wijze mede, de kennis van de Nederlandsche literatuur over de geheele wereld te vergrooten.

ESPERANTO EN BELLAMY

De onlangs te Amsterdam opgerichte stichting « Bellamy Boekenfonds » heeft Esperanto officieel ingevoerd. De bekende boeken van Bellamy « In het jaar 2000 » en « Gelijkheid voor allen », alsmede verschillende brochures zullen binnenkort in het Esperanto verschijnen. De stichting heeft het voornemen alle correspondentie met het buitenland slechts in het Esperanto te voeren.

ESPERANTO IN PLAATS VAN ENGELSCH

De Heer Marujsura, directeur van het Zesde Lyceum te Tokio (Japan) heeft in het eerste leerjaar van zijn onderwijsinrichting in plaats van het Engelsch, het Esperanto als verplicht leervak ingevoerd.

ESPERANTO IN CHINA

Volgens de laatste gegevens betreffende de Esperanto-beweging in China hebben aldaar reeds meer dan 30.000 Chineezeeen een cursus in de wereldtaal gevolgd. In dit land zijn thans ongeveer 50 Esperanto-vereeningen, terwijl er 5 bladen in het Esperanto worden geredigeerd.

ESPERANTO IN DUITSCHLAND

Ofschoon de Esperanto-beweging in Duitschland verboden is, heeft het Duitse blad, de « Generalanzeiger für Schlesien und Posen » een mededeeling gepubliceerd, afkomstig van de Pruisische Academie van Wetenschappen te Berlijn, dat aan den Heer Klemenz Wiczorek is veroorloofd wetenschappelijke werken in het Esperanto te publiceren.

Een merkwaardig boek

Is het Esperanto soepel en rijk genoeg, om even goed als een nationale taal, te dienen voor wetenschappelijke en, meer bijzonder, voor technische werken en publicaties?

« Fine mi komprenas la radion » is er het bewijs van. Schrijver van dit werk is de heer E. Aisberg, ingenieur, opsteller van gekende technische werken, bestuurder van een technische uitgeverijfirma en hoofdredacteur van gekende tijdschriften over radio en televisie.

Het werk is verdeeld in 16 praatjes en uitgewerkt als samenspraak tusschen den 15 jarigen, weetlustigen « sciemulo » en zijn oom « radiulo », radio-ingenieur. Op geniale, maar eenvoudige wijze beantwoordt « radiulo » alle vragen van « sciemuĉjo », en hij slaagt er in niet alleen alle hoofdproblemen van de radiotechniek, maar ook de voorbereidende kundigheden der elektrowetenschap op zeer verstaanbare wijze te verklaren.

Dit zeer merkwaardig boek heeft een geschiedenis.

De eerste zeven praatjes van dit oorspronkelijk in Esperanto geschreven werk, verschenen in 1926 in de « Internacia Radio-Revuo ».

Een lezer uit Praag, de heer Otto Ginz, geboeid door inhoud en vorm dezer artikels, had deze in de Tsjechische taal overgezet en laten verschijnen in het officieel orgaan van het Tsjechische radio-instituut. Ongelukkig, werd na het zevende praatje, de uitgave van « Internacia Radio-Revuo » stopgezet, en daarmee ook het publiceren dezer bijdrage.

Intusschen echter waren « sciemulo » en « radiulo » bij de Tsjechische bevolking zoo populair geworden, dat bij den heer Otto Ginz voortdurend werd aangedrongen, het vulgarisatie-werk voort te zetten. Ten einde raad wendde deze zich rechtstreeks tot den heer

E. Aisberg, van wien hij tot zijn onsteltenis vernam dat er geen verdere praatjes bestonden; ze werden geschreven naar gelang de publicatie van elk nummer van de radio-revuo. Eindelijk echter nam de heer Aisberg aan, het werk te voleindigen om de verdere vertaling in het Tsjechisch mogelijk te maken.

Daarna werd gansch het werk, op duizenden exemplaren, in boekvorm uitgegeven door de uitgeverij « Orbis », waarna het nogmaals verscheen in een radio-maandblad. De vierde uitgave, een weelderig boek, kwam van de Staatsuitgeverij te Praag en werd voornamelijk in de scholen verspreid.

Door dezen buitengewonen bijval kwam de heer Ginz op het gedacht het werk in andere talen te laten overzetten. Daartoe trad hij in onderhandeling met eenige Duitsche Esperantisten. Een Duit-sche uitgave leek echter een onmogelijkheid, inderdaad bestaan er in Duitschland reeds een massa goede werken over radiotechniek. Ook in Hongarië lukte het niet.

Intusschen verscheen een Fransche uitgave. Het succes was zoo groot dat reeds in 1933 deze vertaling aan haar elfde uitgave was ! En wat niet mogelijk was gebleken gebeurde : een groote uitgevers-firma in Stuttgart leverde een Duit-sche vertaling, die op einde 1933 insgelijks aan haar elfde uitgave was !

We gaan niet de geschiedenis van elke vertaling verhalen ; zeggen we enkel dat « Fine mi komprenas la radion » verder nog werd overgezet in het Bulgaarsch, Esthonisch, Grieksch, Hongaarsch, Italiaansch, Lithauwsch, Roemeensch, Russisch, Sloveensch, Portu-geesch (Amerika) en in het Nederlandsch. Verder zijn in voorberei-ding, of zijn ook reeds verschenen, vertalingen in het Engelsch, Noorsch en Poolsch.

Ondertusschen werd het werk ook in Esperanto in boekvorm uit-gegeven door « Literatura Mondo ». Het is een boek dat alle Esperan-tisten-radioliefhebbers noodzakelijk moeten bezitten. Het is te ver-krijgen in Flandra Esperantista Instituto.

H. RAINSON.

Esperanto en la lernejon ?

Jam en la unua epoko de nia movado la propagandistoj konsideris la enkondukon de Esperanto en la lernejojn kiel unu el la ĉefaj celoj de sia agado. Fakte tio estas la ĉefa celo de la propagandado, ĉar se ĉiuj homoj konatiĝus kun Esperanto estas nedubeble ke ili enkondukus ĝin por sia propra intereso en siaj internaciaj rilatoj, ĉu profesiaj, ĉu privataj kaj rapidege nia lingvo fariĝus la ĉefa lingvo de la internacia komerco, radio, filmo ktp.

Bedaŭrinde tiu malnova sopiro ankoraŭ ne estas realigita ! Post kelkaj jardekoj de sindona propagandado, la Esperantistaro sendube atingis sennombrajn sukcesojn sur diversaj kampoj. Ankaŭ en la lernejoj la fervora agado de niaj instruistoj-samideanoj ne restis senfrukta. Multloke jam okazis kaj okazas libervolaj kursoj por la gelernantoj, sed decidan sukceson sur tiu kampo oni ankoraŭ ne rikoltis. Tio ne estas miriga, ĉar tian sukceson ne povas havigi

unuopaj izolaj klopodoj, eĉ se faritaj de la plej sinofera fervorulo, — por atingi grandsignifan sukceson oni devas agi laŭ sistema plano kaj tian povas realigi ne unuopuloj, sed nur celkonscia asocio.

En la postmilitaj jaroj fondiĝis TAGE, la « Tutmonda Asocio de Geinstruistoj Esperantistaj » kiu celas kolekti ĉiujn Esperantistajn instruistojn por propagandi efike la enkondukon de nia lingvo en la lernejon. Malgraŭ la fervora agado de tiu asocio, ĝi ankoraŭ ne sukcesis realigi eĉ la unuan parton de sia tasko, t. e. kolekti la jam esperantiĝintajn instruistojn en apartan asocion por komune agadi por komuna celo. Estas certe, ke Esperanton lernis, precipe lastatempe, granda nombro de instruistoj, el kiuj multaj fervore agadas por nia idealo. Sed estas vere ankaŭ, ke multaj el ili eĉ ne scias pri la ekzisto de TAGE, pri la utilo, kiun ĝi ankaŭ al ili persone povas havigi kaj tial ne aliĝas, ne alportas sian bezonatan kunlaboron, kaj la Asocio ne povas entrepreni grandskalan agadon, ne povas prepari efikan sukceson.

Alia estus la stato de la afero, se la laborema komitato de TAGE povus kalkuli je apogo kaj daŭra kunlaboro de la geinstruistoj, kies bruston ornamas la verda stelo.

Mi volas atentigi per ĉi tiu artikolo la instruistojn kaj instruistinojn pri la graveco de tiu asocio, sub kies neŭtrala tegmento estas loko por ili ĉiuj, sendepende de ilia persona politika konvinko aŭ religia kredo. La anoj de TAGE kunlaboras por disvastigi la uzadon de Esperanto ĉe instruistoj kaj gelernantoj ĉiulandaj, ili interrilatiĝas kun alilandaj gekolegoj, propagandas ĝenerale nian ideon en instruistaj rondoj por tie kreskigi la interesigon, kio estas premiso por la celo : la enkonduko de Esperanto en la lernejon.

Niaj instruistaj samideanoj povus esti enviindaj ! Ili ja posedas jam taŭgan internacian fakan organizaĵon kiu eldonas jam de 15 jaroj « I. P. R. » (Internacia Pedagogia Revuo). Dependas nur de ili plifortigi tiun asocion, kunlabori al la revuo, por ke ĝi fariĝu perfekta interkontaktilo por diverslandanoj, ĉar tia internacia pedagogia revuo kompreneble povus larĝigi la fakan horizonton pli ol nacia revuo.

Kial ili ne faras tion ? Kiu povas esti la kaŭzoj ? En la nuntempaj krizaj cirkonstancoj oni emas pensi pri tiu neŝatata spektro kiu timiĝas ĉiun pene ekvilibratan budĝeton : nova kotizo post tiom da aliaj ! Sed mi ne kredas ke en nia kazo tio estas la ĉefa kaŭzo ! La kotizo ne estas alta, sobra samideano certe povos enbudĝetigi ĝin sen vivdanĝero ! La ĉefa kaŭzo verŝajne estas la simpla fakto ke oni ne konas TAGE kaj ĝian revuon ! Alie multe pli multaj geinstruistoj aliĝus, sentante ke por ili la tutmonda solidareco ne plu estos utopio, se ili povas senti sin jam hodiaŭ en amika kontakto kun kolegoj alilandaj. Tio ja donos al ili plian kuraĝon por la ĝenerala poresperanta agado, sed ankaŭ personan ĝuon kaj multan instruon utiligeblan en la profesia laboro. Vidante kion aliaj kolegoj sukcesas en sia lernejo, en sia landa faka gazetaro, ĉe siaj naciaj fakorganizaĵoj rilate al nia propagando, *vi ankaŭ* plikuraĝiĝos, imitos kaj ankaŭ sukcesos !

Fariĝu do ano de tiu asocio, fariĝu kunlaboranto de la I. P. R. ! TAGE certe havas gravan rolon en la sukcesigo de nia afero ! Fa-

riĝu ĝia pioniro kaj agadu kunlabore kun viaj gekolegoj laŭ kune starigota agadplano ! Tio estas la sola vojo por atingi la enkondukon de nia lingvo en la lernejojn kaj ĝisvivi la tagon kiam vi instruos al ĉiuj viaj lernantoj, en la kadro de la kutima programo, la lingvon kiun vi amas kaj kiu ebligas al ili starigi pli hom-indajn rilatojn en la tutmonda ĥaoso !

Leganto ! Se vi estas instruist(in)o, ne hezitu, prenu tuj poŝtkarton kaj petu de *S.ro P. Korte, Schoolstraat, 13, Veendam, Nederlando*, senpagan specimenon de I. P. R. kaj detalajn klarigojn pri TAGE. Tio estas via devo : almenaŭ konatiĝi kun la Tutmonda Asocio de Geinstruistoj Esperantistaj.

Kaj se vi ne estas instruisto, vi ankaŭ povas plenumi belan taskon. Montru ĉi tiun artikolon al instruisto el via urbo aŭ vilaĝo, demandu lin, ĉu li scias pri la ekzisto de TAGE kaj instigu lin konatiĝi kun ĝi en sia propra intereso kaj en la intereso de nia movado, kies venko ne estas imagebla sen la kunlaboro de la instruistaro.

SIGISMUNDO PRAGANO.

Jubileo Andreo Cseh

En ĉi tiu somero la Esperantistaro inde festis la 25-jaran jubileon de la eminentaj verkistoj K. de Kalocsay kaj Julio Baghy.



Eble malmultaj scias, ke ne malpli grava jubileo atendas nin. Ankaŭ Andreo Cseh jam de 25 jaroj laboras en la servo de nia movado.

Ni ne bezonas tie ĉi larĝe preparoli la meritojn de Andreo Cseh, kiu senriproze laboradas por antaŭenpuŝi la movadon.

Andreo Cseh pliriĉigis nian anaron je miloj da novaj, entuziasmaj adeptoj. Lia fama metodo estas aplikata de centoj da instruistoj en la tuta mondo, vekante intereson ĉe novaj kaj malnovaj Esperantistoj.

Nun ni deziras feste rememori la fakton, ke li dum 25 jaroj senĉese dediĉis sin al Esperanto.

La Haga grupo « Fine Gi Venkos » festos sian 30-jaran jubileon je lundo, la 28-a de Decembro en salono de la Zoologia Ĝardeno, Benoordenhout, 2, Den Haag. La intenco estas en la sama vesperofesti la 25-jaran jubileon de Andreo Cseh kaj transdoni al li memoraĵon pri ĉi tiu grava fakto.

Ni invitas la Esperantistojn partopreni en ĉi tiu festo persone aŭ perletere. Leteroj por laŭtleĝo en la festvespero povas esti sendataj al la jena adreso.

F.ino C. E. van Voorthuijsen,
Noordeindsplein, 2a, Leiden, Ned.

Tiuj, kiuj volas partopreni en la donaco (dependonta de la kolektiginta sumo) povas sendi sian kontribuon al la sama adreso, antaŭ la 15-a de Decembro 1936. (Poŝtekkonto de F.ino v. Voorthuijsen : 133688).

LA JUBILEA KOMITATO :

F.ino C. E. van Voorthuijsen, Noordeindsplein, 2a, Leiden

F.ino S. M. Grönloh, Rijnkade, 45, Leiden

S.ino M. C. van Nooten-van Nooten, Jac. Mosselstr., 44, Den Haag

F.ino N. Rademaker, Westplantsoen, 43, Delft

Amiko Jan van As 60-jara

1876

30 NOVEMBRO

1936

Kvankam nia movado baldaŭ festos sian duon-centjaran jubileon, ĝi ne posedas tre multajn adeptojn, kiuj estas pli aĝaj ol la movado mem. Tial mi opinias ke estas menciinde, se iu ajn Esperantisto festas la 60an datrevenon de sia naskiĝo. Kaj la « festporko » de la 30a de Novembro estas nia amiko Jan van As, membro de « Flandrema Grupo Esperantista » kaj sekve de tio, membro de « Flandra Ligo Esperantista ».

Jen kelkaj detaloj pri lia vivo. Li naskiĝis en Bergen-op-Zoom (Nederlando). Dekkvarjara, lin altiris la maro kaj li fariĝis militmaristo, ĉe la Reĝa Nederlanda Militmaristaro. Estante proksimume 25 jara, kontraŭmilitistaj ideoj trapenetris en lin, tiel ke la militaj aŭtoritatuloj eksigis lin de la ŝiparo longe antaŭ la finiĝo de lia servotempo.

De nun komenciĝis por Jan zorgoplena periodo. Diversmaniere li klopodis perlabori la ĉiutagan panon.

Ni renkontas lin kiel vendejkomerciston, velkudriston, dompen-triston, ŝoforon kaj eĉ en aliaj metioj.

En la fatala jaro 1914 li estis ŝoforo en Antwerpen. La registaro belga rekviziciis lian aŭtomobilon, kaj li devis sekvi. Li, la kontraŭmilitisto kaj Nederlandano estis envicigita en la belga armeo ! De Luik ĝis malantaŭ la YSER li servadis kiel ŝoforo !

Kiam la belga armeo povis respiradi malantaŭ la YSER, oni klopodis la ŝoforojn subskribigi kontrakton, kiu valorus ĝis la fino de la milito.

Sed Jan diris : « Unufoje mi subskribis tian kontrakton, la duan fojon mi dankas ». Kaj li demandis ateston pri la posedrajto de sia aŭtomobilo, adiaŭis siajn samsortanojn kaj iris Londonon. Tie, li ĝis la fino de la milito en municifabrikejo laboris. Kelkaj neder-

landaj amikoj sukcesis ebligi al lia ezino de el Antwerpen tra Nederlando atingi Londonon.

Post tiuj ĉi malmultaj detaloj el la privata vivo de nia 60-jarulo, ni rakontu pri lia Esperantista vivo. Li Esperantistiĝis en 1911. Jes : en 1914. Fakte li do festas ankaŭ sian 25-jaran Esperantistan jubileon. Sed ni estas certaj ke li mem eĉ ne pensas pri tio, ĉar baldaŭ poste li estis kiel tiom multaj : perdita por la movado. Sed ne entute ! Ĉar en 1924, kiam li fine travivis trankvilan vivperiodon, li revenis al sia malnova amo, instigite de malnova amiko, kiu intertempe ankaŭ Esperantistiĝis. Fervore li lernadis kaj multe legis kaj korespondadis. Krom kelkajn flandrajn, li ankaŭ ĉeestis la Universalajn Kongresojn en Kolonjo, Stockholm kaj Wien. Nun li estas aktiva membro de la « Flandrema », juna maljunulo kaj bela perlo de sia grupo. De tempo al tempo aperas artikoleto el lia plumo en «Flandra Esperantisto» kaj eĉ en «Heroldo» kaj aliaj Esperanto-jurnaloj ni renkontis artikolojn de li. Ni ne dubas ke dum la semajno de 30 Novembro ĝis 6 Decembro mankas prilivaj de varma amikeco kaj samideaneco al nia 60-jara amiko Jan van As.

A. LODEMA.

Distingo

Laŭ decido de la 28a de Oktobro, Sia Reĝina Moŝto Wilhelmino de Nederlando honorigis S.ron LODEMA, oficisto de la Nederlanda pilotadservo en Antverpeno, per la arĝenta honormedalo de la ordeno de Oranje-Nassaŭ.

S.ro LODEMA festis la 2an de Novembro, sian 40-jaran jubileon en regna servo.

La estraro de Flandra Ligo kaj la redakcio de Fl. Esp. gratulas lin kore en sia propra nomo kaj ankaŭ en la nomo de ĉiuj siaj membroj.

Pri oficiala Lingvo en Belga Kongo

En la « Handelsblad » de Antwerpen, mi legis artikolon pri nova lingvo en Kongo. Mi resumas. La ŝtato havas la planon, el la multaj diversaj lingvoj (ĉirkaŭ 200) kiuj estas parolataj de la loĝantoj, nur allerni unu oficialan lingvon. Estus tro malfacile por ŝtatoficistoj allerni ĉiujn enlandajn lingvojn kaj dialektojn. Post longa studado oni intencas el ĉiuj nur preni kvar, nome : Kiswahili, Lingalao, Kikingo kaj Tŝilubao. Fine oni elektis la lastan. Jam pli ol dek-kvin jarojn S.ro Franek, eksministro, okupis sin pri ĉi-tiu afero. Li donis la preferon al Lingalao, sed bedaŭrinde tiu provo malsukcesis. Kial Ĉar Lingalao estas tro artefarita lingvo, nur parolata de kelkaj. Nun oni proponis kunmeti komisionon ekzistantan el misiistoj kaj oficistoj sub direktado de la kolonia estraro. La tasko de l' komisiono estus : 1. gramatiko fiksota laŭ reguloj. 2. la vortelektio. 3. la reguloj laŭ la normala elparolo kaj la decido pri fonetiko. Ĉi tiu lingvo estus allernota al personoj, kiuj sin preparas por la kolonia kariero, kaj ankaŭ en la oficialaj institucioj en Kongo. Kiam

sukcesos ĉi-tiuj preparaj laboroj, tiam formiĝos centra komisiono por disvastigi la lingvon tra la regionoj kaj plifaciligi en ĉi-tiu lingvo : la literaturon. Kompreneble oni ne povas aranĝi tion dum kelkaj jaroj. Ni ne postvivis la plenumon, sed post duona jarcento estus eble ke en la tuta Kongo oni parolus kaj komprenus unu oficialan lingvon, krom sia propra lingvo. La leganto konvikiĝas ke en la ministraro de kolonioj troviĝas homoj kiuj havas bonan ideon pri la misio kiu Belgujo plenumas kiel kolonia lando, homoj kiuj vidas en la estonton, homoj kapablaj por al ili konfidi taskon...

Dum mi tralegis ĉi tiun artikolon mi pensis al alia artefarita lingvo ESPERANTO, la mondhelplingvo kaj komparis ĝin kun la nova ideo de la Belga registaro pri lingvoaferoj. Kiom da mono, kiom da laboro, kiom da kaprompiĝoj oni bezonas por havigi bonan rezultaton. Al estontaj koloniaj oficistoj oni intencas allerni Tšilubaon ! Eble, kiam ili restus en Kongo tri, ses, naŭ, eĉ dekdu jarojn, kaj poste revenos al la patrujo, tiam ili komprenas enlandan lingvon, sed kian profiton ili havas al tio en la patrujo mem Neniun ! La lingvo de D.ro Zamenhof jam ekzistas kvindek jarojn. En ĉiuj partoj de la mondo oni parolas Esperanton. Pri Esperanto ekzistas jam miloj da libroj, ekzistas ankoraŭ la Ĉseh-instituto en Den Haag (Nederlando) kaj kie oni estas tuj agopreta sendi tiom da instruistoj, kiel necese por allerni la lingvon al miloj da homoj. Do, nenecese estas ankoraŭ atendi kvindek jarojn por havigi kompreneblan lingvon. La okazo kuŝas sub la mano, oni kaptu ĝin : lernu al la enlandanoj ESPERANTON, instruu ĝin al la estontaj koloniaj ŝtato-oficistoj kaj poste, kiam ili revenas al la patrujo, ili havas bonan interkomprenilon kun la aliaj Eŭropaj popoloj. Samtempe oni ŝparus multan monon, ĉar Esperanto estas 50 % pli facila por lerni ol aliaj lingvoj. Eble inter niaj gelegantoj troviĝas personoj, kiuj povas montri ĉi tiun artikolon al homoj, kiuj estas pli influhavantaj ol mi.

JEVA.

POR NIA REVUO :

M. D. K., Antwerpen Fr. 5,—

Diversaĵoj

D.ro Corret mortis.

Doktoro Pierre Corret en Parizo subite mortis la 7-an de Aŭgusto lasta, 55 jara. Esperantisto de 1902, Corret fariĝis L. K.-ano 1908 kaj akademiano 1909. Li multe agadis por Esperanto, kiun li brave kaj science defendis kontraŭ atakantoj kaj preterzamenhofuloj. Li fariĝis kuracisto, estante la unua kiu verkis kaj defendis ekzamenan disertacion pri esperantista temo, « la bezono kaj eblo de helpa lingvo por la medicino », kolektinte por ĝi bonan materialon por esperantistoj.

Corret zorge gardis kaj defendis la Zamenhofajn tradiciojn. Lia tro frua morto estas vere bedaŭrinda en tempoj kiam la esperantistaro urĝe bezonas lian bonan ekzemplon de senpeka fideleco al la Majstro.

Oni detruis la Oomoto-Centron.

Laŭ informoj venintaj el Japanujo, la japana registaro ordonis detruiri la centron de la Oomoto-movado en Ajabe. Ĉi tiu nova religia movado, estrita de S.ro Onisabro Deguĉi, rapide kreskis en Japanujo kaj grandskale uzis Esperanton por siaj internaciaj interrilatoj. La detruita centro konsistis el ĉ. cent konstruaĵoj.

* * *

Esperanto per radio.

Por Esperanta propagando (kaj statistiko) sur radio-kampo ni bezonas la nomojn kaj adresojn de Ĉiuj Esperantistoj, kiuj posedas radioaparaton. Afable, sed urĝe, ni petas ĉium tian Esperantiston bonvoli tuj sendi sian nomon kaj adreson al fraŭlino J. Plyson, 185, Jourdan Straat, Bruselo, Ni tuj dankos per alsendo de senpaga ekz. de S.O.S. — bulteno, kaj tuj poste per Listo de Respondoj.

* * *

Korespondemuloj!

Niaj membroj fervore deziras korespondi kun gesamideanoj en ĉiuj landoj tra la mondo, kaj ni volonte kaj senpage enpresigos vian adreson en nian monatan gazeton « Amikoj de Esperanto », kiu estas eldonata ekskluzive por Esperanto-korespondantoj kaj libroamantoj. Sendu vian adreson senprokraste — hodiaŭ!

Abonkotizo por unu jaro : 1 svisa franko aŭ egalvaloro. (Sendu poŝtmandate).

Postulu specimenon!

Adreso : « Amikoj de Esperanto », 2, Kudan 3-ĉome, Kojimaĉi-ku, Tokio, Japanujo.

Nekrologo :

La 24an de Novembro mortis en Ekeren, en la aĝo de 64 jaroj, S.ino Pittoors, patrino de nia simpatia kaj entuziasma ligano S.ro Pittoors.

La Ligo kaj precipe la Flandrema prezentas al la funebranta familio, siajn plej sincerajn kondolencojn.

Momenton ni ridu...

PRETER LA CELO

Patriko, Irlandano, rakontis pri sia vojaĝado.

« Mi albordiĝis sur insulon, kaj komencis esplori », li diris.

« Kiam mi atingis la mezon de la insulo, mi vidis la plej grandan urson, kiun mi iam vidis dum la tuta vivo ». Li paŭzis, dramece, tiam daŭrigis la paroladon.

« Estis nur unu arbo sur la insulo, kaj la plej malalta branĉo estis ses metrojn super la tero, kaj mi saltegis al ĝi ».

« Ĉu vi sukcesis ekkapti ĝin ? » demandis unu el lia aŭdantaro.

« Suprenirante, ne ! » respondis la Irlandano, « sed, malsuprenfalante, mi ja sukcesis ! »

Rakontis S.ro Taylor, Halifax.

De gelukkige dorpling

Een groepje jonge Roemenen maakte een uitslapje per spoor. Ze babbelden genoeglijk in Esperanto. In denzelfden coupé zat ook een oude boer, die belangstellend naar hen luisterde en eindelijk vroeg:

— Welke taal spreken jullie, Fransch ?

— Neen, vadertje, antwoordden zij, wij spreken Esperanto.

— Esperanto ? Wat is dat voor een taal ?

— Dat is een taal, die gemakkelijk ieder mensch kan leeren, ook de minder ontwikkelde. Zij dient om de menschen van dienst te zijn bij hun verkeer met buitenlanders, wier taal men niet kent.

— Ho, Gode zij dank, riep de oude uit en hij maakte een kruisje. Dat ik dit nog mocht beleven.

Het gesprek verstomde en ieder wachtte gespannen een verklaring voor die vreemde vreugde. Even daarna vervolgde de oude :

— Weten jullie wel, dat ik dikwijls er over nadacht, dat er een taal moest bestaan, waarin de menschen van verschillende nationaliteit elkaar konden verstaan ?

Toen ze dat hoorden, kwamen de jongelui wat verwonderd naderbij. Dat Leibnitz of Descartes en zooveel ander denkers tot dit denkbeeld kwamen, was begrijpelijk. Maar zoo'n domme boer ? Hoe kwam die daarbij ?

— Waarom zou u zoo'n taal willen ? vroeg hem een der jongelui, niet zonder eenigen spotzucht.

En de oude antwoordde :

— Ik heb een klein landgoed bij de grens, dat ik zelf bebouw en ook moet ik zelf mijn waar aan den man brengen. Gezeten op mijn ezel, die het fruit draagt, bezoek ik niet alleen Roemeensche dorpsmarkten, maar ga ook dikwijls de grens over naar Hongarije en Oostenrijk. Ik was bij de Kroaten, trok door Bulgarije naar de Serven, in Albanië en ook in Italië was ik. Een anderen keer ging ik benedenwaarts door Turkije en bij de Grieken in Saloniki ben ik geweest. Overal waar ik kwam was mijn ezeltje dadelijk bevriend met vreemde ezels en begreep ze maar al te goed, maar ik — oude groote ezel — kon zelfs niet een woord wisselen met de bewoners van die landen !

Nu begrijpen jullie waarom ik zoo blij was toen ik hoorde, dat de menschen eindelijk een middel vonden om ook zoo wijs te zijn als mijn ezel.

Uit Lab. Esperant.

Henriko FISHER, Galatz.

Grupa Vivo

ANTVERPENO — FLANDREMA GRUPO ESPERANTISTA.

Kiel kutime la plej granda nombro de niaj membroj ĉeestis regule la kunvenojn. Dum la lastaj kunvenoj ni proponis ŝangi de ejo. La profito kaj malprofito estas preparolita, kaj la gemembroj decidis translokiĝi al « Het Dykstershuis », Koningin Astridplein, proksima al la stacidomo, kiu certe havas grandan avantaĝon por la fremduloj. Oni faris jurnalvesperojn por devigi ĉiujn paroli esperantlingve. La prezidanto devigis ĉiujn redakti diversajn artikolojn. Ili bone sukcesis.

BRUSSEL — N. E. L. E.

Op Donderdag 22 Oktober herdacht onze afdeling haar vijfjarig bestaan. Deze heuglijke feestvergadering werd voorafgegaan door een gezamenlijk avondmaal. Daarna volgden de onvermijdelijke gelegenheidstoespraken.

Onze voorzitter, S.ano G. Broodcoorens, dankte den heer Rainson, algemeen bondsvoorzitter, die met zijn aanwezigheid ons aange-naam verraste. Namens Flandra Ligo mochten we, bij monde van den bondsvoorzitter, de hartelijkste gelukwenschen in ontvangst nemen voor onze onvermoeibare werking in het ondankbare Brussel. Na een woord van dank voor den steun door onze afdeling steeds bereidwillig aan Flandra Ligo bewezen, deed hij beroep op onze verdere medewerking.

Onze afdelingssekretaris, S.ano E. Cortvriendt, hield dan een toespraak waarin hij de geschiedenis onzer vereeniging schetste. Vooral de nieuwe leden toonden belangstelling voor de gepresteerde werking, welke zij wellicht niet zoo belangrijk dachten.

Onze voorzitter sloot het officieele gedeelte dezer heugelijke vergadering, met een woord van dank tot al de leden. Een speciaal dankwoord richtte hij tot diegenen die als stichters van N. E. L. E., na vijf jaar nog dagelijks hun beste krachten aan de vereeniging wijden.

Door S.ano Broodcoorens werd daarna een belangrijke voordracht gehouden over de geschiedenis der talen, onderwerp voor hetwelke onze leden een warme belangstelling toonden. Als slot werden enkele liederen gezongen.

Onze winterleergang begint op Donderdag 3 December a. s. De propaganda hiervoor werd flink aangepakt. Vooral de Vlaamsche vereenigingen van Brussel werden bewerkt nl. Davidsfonds, Willemfonds, V. T. B., Jeugdherberg-Centrale, Ver. voor Beschaafde Omgangstaal e. a. Ook rekenen wij op een flink aantal kursisten.

Op 29 Oktober werd door de zorgen van de « Esperantista Re-presentantaro Brusela », waarvan N. E. L. E. deel uitmaakt, een buitengewone propaganda-avond gehouden in het Paleis voor Schoone Kunsten. Deze propaganda-avond werd voorafgegaan door een thee aangeboden aan de vertegenwoordigers der pers en aan vooraanstaande Esperantisten.

De feestavond zelf, gehouden in de prachtige zaal voor kamermuziek, werd ingezet met Esperanto-liederen en muziek. De heer Buenting uit Nederlandsch Indië gaf op meesterlijke wijze een

proefles volgens de Cseh-methode. Toespraken werden gehouden door Dr Kempeneers en door onzen algemeenen voorzitter H. Rainson. Gedurende de pauze werd een bezoek gebracht aan een tentoonstelling van Esperanto-literatuur.

Stellig zal die avond er toe bijdragen sympathie voor Esperanto te wekken in de leidende kringen van Brussel.

OOSTENDE — OSTENDA GRUPO ESPERANTISTA.

La 9an de Novembro ni kunvenis en nia nuna ejo Prins Baudewijn. La tagordo temis pri : reelektado de la estraro, letervespero, Csekurso organizota, ligkunvenoj, k. t. p. La ĉeesto estis tre multnombra : 24 geanoj ĉeestis.

Post la disdono de la legajoj kaj biblioteklibretoj-kiuj estas nun 25 en nombro — ni komencis la reelekton.

Transdonis siajn postenojn : J. Roelandts kiel sekretario kaj L. Houpe kiel kasisto. Plie estis elektitaj propagandisto kaj delegitoj por la ligkunvenoj.

La rezultato estis jena : prezidanto : S.ro Snykers, Kerkstr., 32 ; sekretariino : F.ino R. Degraeve, Pet. Benoitstr. 27 ; kasistino : F.ino M. Clauwaert.

Akceptis funkcii kiel delegitoj por reprezenti la grupon dum la lingkunveno : S.ro Dhaenen kaj F.ino M. Clauwaert.

Priparolita estis nun la Cseh-kurso. Pri tio ni decidis rekomenci la kurson je la komenco de Februari kaj akcepti kiel gvidanton la Cekon S.ro Sole Karolo.

Pri la liga demando, esplori la eblecon organizi Cseh-kurson en Blankenberge ni estas ankoraŭ en interkonsiliĝo.

Anoncon ni enpresigis en Heroldo por letervespero okazonta la 15an de Decembro.

Nia aŭtovetureto dum Oktobro al Knokke, Sluis, Bruĝo, bone sukcesis ĉar 27 anoj kunveturis.

RONSE — « LA PACA STELO ».

Dum nia lasta propagando por la remalfermo de 2 novaj kursoj, ni bedaŭras la rezultaton, ĉar malgraŭ la oferado de multaj grupoj el nia samideanaro por disdono de pordo al pordo flugfoliojn, ĝi ne estis sufiĉe fruktodona.

La rezultato estis 12 novaj elementoj kvankam la duoblo enskribiĝis. Proksiman jaron, ni agos alimaniere kaj jam nuntempe la komitato pli ol unu fojon jam pritraktis tiun gravan punkton ; eble nia grupo sekvos la belan imitindan ekzemplon el Kortrijk prenante alilandanon por doni en nia urbo Cseh-metodan kurson.


Dum tiu-ĉi monato ni havas tre interesan programon, kiu ĉies guston kontentigos, nome kantvesperon, tradukadon, gramatikan parton & fine amuzan vesperon.

Dum la lasta monato, ni fares ankaŭ tre seriozan alvokon por ne forgesi la « Librotago(n) » kaj ni esperas ke ni restos je la plej alta ŝtupo por la alaĉeto de libroj.

Gesamideanoj ! Komprenu vian devon ! Tiamaniere, ni povos diri por fini la lastan monaton « Fino bona — ĉio bona » kaj tiam finiĝos je kontentiga maniero la nuna jaro.

La angulo de la serĉemuloj

PROBLEMO 14 — MAGIA KRUCO



Formu per la ĉi subaj literoj la samajn vortojn Horizontale kaj Vertikale.

- 1) Observisto de alta konstruaĵo (R).
- 2) Parto de armeo.
- 3) Ludantoj en Teatroj.
- 4) Ĉefaj personoj de kolekto da malbonaj homoj (R).

8 a, 2 b, 2 d, 4 e, 2 f, 3 g, 7 i, 2 j, 5 n, 4 o, 9 r, 4 s, 8 t, 2 u.

PROBLEMO 15 — EKVACIO-ENIGMO

Donu la valoron (difinon) de x en la sekvanta ekvacio :

$$(A-B) + (C-D-E-F) + (G-H) + (I-J) + (K-L-M) + (N-O-P-R) = X.$$

se vi scias ke

A = Milita akompano

B = Parto de domo (loko)

C = Publika parolo

D = Kolekto (R)

E = Partikulo

F = Sufikso (daŭro)

G = Lignospeco (R)

H = Aprobo (R)

I = Rektangule kurbigita najlo

J = Terpeco

K = Loĝanto de la alia tera duonglobo

L = Ideala modelo

M = Konkluda konjunkcio

N = Alta loko superstaranta la bordon de maro

O = Prepozicio por esprimi kaŭzon, motivon

P = Pagilo (R)

R = Metalo (R)

Ekzemplo $(A-B-C-D) = X$

A = Longdaŭra uzo de spritaj fortoj = Pripensado

B = Prepozicio = Pri

C = Energia ago de korpo aŭ spirito (R) = Pen

D = Sufikso = ado

PRIPENSADO — PRI — PEN — ADO = S.

X = S.

Ni forlotumos unu premion por ĉiu Problemo inter la bonaj solvintoj.

La solvoj estu ensendataj antaŭ la 5a de Januaro 1937 rekte al S.ro F. Volders, Bredastraat, 94, Antwerpen.

P. N. — La vortoj kun (R) estas radikvortoj.

Premioj. Ni ricevis premiojn de NENIU !!! Nian koran dankon !

FLANDRA LIGO ESPERANTISTA **(Vlaamsche Esperantisten - Bond)**

Voorzitter: H. Rainson, Hombeeksche steenweg, 54, Mechelen.
Ondervoorzitter: E. Cortvriendt, P. Van Humbeekstraat, 3, Brussel-West.
Sekretaris: Gerard Debrouwere, Magdalenastraat, 29, Kortrijk.
Penningmeester: Adolf De Keyzer, P. van Humbeekstr., 3, Brussel (West).
Propaganda: Gerard Lenaers, Willemstraat, Hamme (O. Vl.).
Postcheck: Flandra Ligo Esperantista, Brussel, Nr 2321.50.
Orgaan: « Flandra Esperantisto », maandblad.
Lidmaatschap: 5 fr.; met maandblad: 25 fr.

AFDEELINGEN :

Aalst: « Pioniro ». Sekr.: Molenstraat, 30.
Antwerpen: « Flandrema Grupo Esperantista ». Sekr.: Statiestraat, 156, Berchem.
Brugge: « Katolika Junulara Esperanto-Grupo ». Guido Gezellelaan, 15.
Brussel: « Nia estas la Estonteco » (N.E.L.E.). Sekr.: P. van Humbeekstr., 3.
Kortrijk: « Esperantista Grupo ». Sekr.: Moeskroenstraat, 9.
Leuven: « La Nova Tagiĝo » Sekr.: Tienschestraat, 106. Sro Fr. Frantzen.
Lichtervelde: « La Tagiĝo ». Sekr.: Wetstr. 44.
Oostende: « Ostenda Grupo Esperantista ». Sekr.: P. Benoitstr. 27.
Mechelen: « La Estonto ». Sekr.: Vekestraat, 25.
Roeselare: « Ruselara Esperantista Grupo ».

VERTEGENWOORDIGERS :

Aasche (Brab.): L. De Rop, Tenberg, 24.
Astene: M. Vanderlinden, Dorp, 54.
Diksmuide: M. Maekelberg, Yzerlaan.
Gent: F-ino J. Terry, Raapstraat, 82.
Harelbeke: A. Doornaert, Stasegemstraat, 97.
Mortsel: H. Van Durme, Eggestraat, 21.
Ronse: C. De Boes, Wijnstraat, 81.
Tielt: R. Plettinck, Steenweg naar Marialoop.
Vichte: G. Faveete, Statiestraat.
Wilrijk: D. Mortelmans, Egied Segerslaan, 14.
Woumen (W. Vl.): H. Verfaillie, Schrevelstr.

Ingevolge besluiten genomen tijdens de Kongresvergaderingen te Gent, betrekkelijk de werking en het beheer van den Bond, zijn al de groepen en vertegenwoordigers uitgenoodigd geworden hunne vraag tot aansluiting schriftelijk te vernieuwen.

Hierboven zijn alleen vermeld deze die hieraan gevolg gegeven hebben vóór 15 November. De andere zullen opgenomen worden in de volgende nummers.

Een oproep is ook gedaan tot de personen welke bereid zijn de taak van vertegenwoordiger te aanvaarden in de plaatsen waar F.L.E. er nog geen bezit. Toetredingsbulletijnen hiervoor mogen aangevraagd worden aan het sekretariaat.

OSTENDO

HOTELO METROPOLE

Kerkstraat, 32

75 komfortaj ĉambroj kun fluanta akvo, varma kaj malvarma. Centra hejtado. Lifto. Aŭtomolilejo. Kuirejo kaj kelo bonreputaciaj.

MODERAJ PREZOJ

S-ano Snykers havas la plej bonajn rekomendojn kaj persone direktadas.

DRUKKERIJ

★

Aŭtomata Presejo

H. BRAEKEVELT

Statiedreef, 177, Roeselare.

Posedas vastan klientaron en la flandraj provincoj.

Presejo konata pro sia belgusta kaj moderna preso.

Liveras al la diversoj esp. grupoj kaj ligoj. Sendevige petu prezoferton kaj modelojn.

Tel.: 1080.

“BREUGHEL”

SPIJS- en DRANKHUIS

Em. Jacquainlaan, 37, Brussel

■
Lekkere Dranken

Fame konata pro siaj bongustaj kaj malmultekostaj manĝoj

Ejo de N. E. L. E.

(Brusela grupo Esperantista)



Café “Nieuwe Carnot”

FRANS NEEFS-D'HELDT

Carnotstraat, 70 — Antwerpen

■
Plej bonaj trinkaĵoj.

Salonoj por societoj — Malvarmaj

manĝaĵoj — Bonega servado.

■
Ejo de Flandrema Grupo.

LUOTA

1/4 pago: 75 fr. por 12 monatoj;
50 fr. por 6 monatoj.

1/8 paĝo: 50 fr. por 12 monatoj.
30 fr. por 6 monatoj.